

Fajrero 4/1960

FABELA REALO

Inter la libroj de mia infanaĝo okupas sian lokon ankaŭ negranda bindaĵo-volumo entenanta aron da rakontoj pri mistera fora lando meze de Afriko. Ĝi iam vekis en mi imagon pri la ĉasista febro kaj donis impreson pri ĝangalo, sed neniel min ĉagrenigis pro la mizeraj indiĝenoj.



Kaj jen, la mondo ĝis nun ignora, burĝaro ĝis nun neglekta kaj inerta, strabe rigardas la okazintaĵojn. Rapida evoluo forviŝis la romantikan polvo . . . Anstataŭ banala "mistera Afriko" ni diras kaj legas "liberigo de Kongo", anstataŭ kolonio – sendependa ŝtato – respubliko.

Dum imperialisma invado amase estiĝas novaj ŝtatoj sur Afrika teritorio kiel forta apogo por naciliberiga batalo de la tuta kontinento. Okazis, ke en du tagoj oni povis kalkuli tri eventojn. Tri landoj proklamiĝis liberaj en mallonga tempodaŭro. En Kongo devas batali popola Konga armeo. Najbaraj landoj tuj promesis helpon. Sed belgaj aventuristoj kaj ties potencoj protektantoj de komence penadas reakiri iaman pozicion, ĉe neobeinto

la decidon de la Sekureca Konsilantaro.

Ĝi estas grava malatento de la UNO-ĉarto kaj de ĉi supera instanco de internacia vivo. Tamen ekzistas solvo, unura eblo, kiel garantii la pacon: forigi fremdajn armeojn kaj konservi unuecon. La popolo de Kongo, malgraŭ grandaj oferoj, jam kreas sian grandan fabelan realon kaj ĝi baldaŭ batalprenos por si tiun rajton antaŭ la okuloj de la tuta mondo.

O. Kníchal

Prof. d-ro Aleksandras D A M R A U S K A S

(Biografia skizo)

Aleksandras D a m b r a u s k a s (en Litovio li estas eble pli konata laŭ la pseŭdonimo Adomas Jakŝtas, al la esperantistaro Dombrobski) naskiĝis en litva familio de terkulturistoj la 8-an de septembro 1890 (laŭ la Juliana kalendaro la 27. VIII. 1890). Post la gimnazia kurso en Silauliai, en 1880, li komencis studi matematikon en la Peterburga universitato, tamen poste absolvis la pastran seminarion en Kaunas kaj Peterburgan eklezian akademion, kiun li finis kun grado de magistro. Post nelonge pro politikaj cirkonstancoj de tiu tempo li estis por 5 jaroj (1889-1894), ekzilita en urbeton Uatĵujna (norda Rusujo), kie renkontiĝis kun alia granda litovo D-ro V. Pietaris. (Tion menciis estas grave pro tio, ĉar nome en Ustĵujna komenciĝas lia esperantista agado, ĵus aperis la unuaj E. -libretoj de Zamenhof 1887).

En 1902 A. Dambrauskas jam estas profesoro de la Peterburga eklezia akademio. En 1906 li transloĝiĝas en Kaunason, kie pasigas sian vivon ĝis la morto

mem la 19-an de februaro 1938.

Li estis profunda, larĝa kaj fortika persono, restiginta valorsignifajn postsignojn en ĉiuj sferoj de la vivo. Li estis rimarkinda publicisto, populara poeto, serioza sciencisto, teologo, meritplena sociaganto, fama literatur- kaj artkritikisto, mondskala esperantisto. Li estis homo, kiu sentis respondecon pro ĉiu horo de sia vivo. En la matematika afero notindaj estas liaj verkoj: "Pri novaj trigonometriaj sistemoj" (originale verkita en Esp. 1906 kaj en 1908 tradukita en la francan), "Pri unu speco de kurbaj linioj" (1905 ankaŭ en Esperanta) k. a.

Li persone rilatis kun Zamenhof ĝis la morto de l'Majstro kaj en 1890 verkas kaj aperigas la unuan lernolibron de la lingvo Esperanto por litovoj- "Mokintuve tarptautiškos kalbos D-ro Esperanto", reeldonitan en 1908. En 1908 li eldonis sian esperantan "Versaĵareton", en 1908 la libron "Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj". En 1910 "Esperanto kiel scienca helpilo", li verkis la unuan litovlingvan biografion de Zamenhof en "Estigintaj lumiloj", 1930. Krome de tio, tiu senlaca viro estis prezidanto de Litova Esperanto Asocio, redaktis ĝian organon "Litova Stelo", iniciatis eldonadon de E-libroj (Litova Almanakoo" k. s.), estis Lingvakomitatan ĉe E. -Akademio. Ĝenaraldire, li estis unu el la plej eminentaj E. -pioniroj kaj spiritus movens de tuta E. -movado en Litovujo ĝis sia morto mem. Kompreneble, en tiu ĉi mallonga skizo ni eĉ ne povas enkalkuli aliasferan agadon de la eminentulo.

Pro meritoj de A. Dambrauskas por la sciencoj li en 1922 estis nomita honoris causa profesoro de la Litova universitato, jam ne menciante la doktorojn gradojn pro la matematiko, kaj pri la filozofio.

K. Maudzius

Skribis al ni Hilda DRESEN kaj sukceson en nia laboro. Ŝi almetis kelkajn poemojn, el kiuj ni prezentas:

ERIKO

Floras la eriko, floras la eriko,
bonodoro rava kaj abela zum',
En kviet' mirinda sole ĉi muziko,
kaj kareso milda de l' aŭtuna sun'.

Sidu aŭ ekkuŝu, kaj vi kvazaŭ dronos
en la lilaj ondoj de l' eriko mar'.
Tuta erikejo nun por vi aromas,
dum vi tiel kuŝas meze de l' florar'.

Por feliĉo tia vi la sorton dankas,
ŝi memoru, ne forgesu, ke – ho ve!
al tiom multaj la ebleco mankas
povi tiel kuŝi sur la erikej'.

Leopold STAFF:

AMIKAJ PERDI

Ami kaj perdi, vei kaj deziri
Fali dolore kaj sin levi pene
Krii sopiron "For" kaj "Gvidu" diri
Jen estas vivo: nul', sed kiam plene . . .

Kuri dezerton post unu juvelo,
Iri dronejon post perda miraklo,
Ke restu sole kiel viva celo
Spuroj en sablo kaj rondoj en akvo . . .

Trad. Marius Dastych

SEN LINGVOSCIO EN FREMDAJ URBOJ

Jam aperis ofte raportoj pri okazintaĵoj, kiam montriĝis, ke ne estas facile interkompreniĝi eksterlande sen la necesa lingvoscio. Jen unu el la plej freŝaj! Junia numero de hungara junulara pionirrevuo "Táborüz" konigas vojaĝraporton de sia kunlaboranto pri ties vizito en Moskvo. Jen parto el ĝi: "Mi neniam ŝatis, se en nekonata loko min akompanis interpretisto aŭ la gastiganta dommastro. Mi ŝatis lukti kun la malfacilaĵoj de la fremda lingvo, kun la nekonataj kutimoj. Dum duona tempo oni povas tiel la duoblon sperti . . . Sed ne sukcesis . . . tamen subite tuta urbo fariĝis mia interpretisto. Kiam oni eksciis, ke mi estas eksterlandano, nekonataj homoj aliĝis al mi, ili akompanis min, klarigadis. Ekzemple en bakaĵvendejo la vendistoj kaj la aĉetantoj kune post longa tempo decidis, kion mi deziras aĉeti. (Sed mi ne tion volis.)"

P. B.

N I D I S K U T A S P R I I N F O R M A D O

En esperantista movado partoprenas libervolaj aktivistoj. Estas grave, ke ili neniam kompromitu la movadon. Iam okazas, ke mankas al ili pli da memkritiko kaj konscio pri nekonvena konduto. Ni rigardu kelkajn cirkonstancojn, kiuj estas gravaj en persona kontakto de aktiva esperantisto kun la publiko.

1. Ne parolu pri Esperantoj al homoj, kiuj ne deziras aŭdi kaj paroli pri ĝi. Eĉ mildan trudon povas sekvi negativa reago. Lernado nur pro amika rilato al esperantisto ĉesas

kun la amikeco kaj estas nur supraĵa. Kompreneble en kontaktoj ni ne kaŝu nian esperantistecon, ni male estu fieraj pri ĝi, sed ni obeu la regulon de bontono: el la propra iniciato ne tro paroli pri ni mem kaj ankaŭ ne pri niaj aferoj. Ni nepre evitu impresi fanatikece kaj troigadi. En informado ni ĉiam estu objektivaj kaj realaj, laŭeble ni eliru de la science bazitaj informoj.

2. La dua grava eraro de kelkaj esperantistoj estas, ke ili ligas en la propagando de Esperanto alian propagandobjekton kaj agitas por ambaŭ samtempe, eble eĉ senintence. Aŭskultanto poste prave havas impreson, ke inter ambaŭ aferoj estas ia parenca rilato. En pluraj kazoj tia rilato povas malutili, eĉ se temas pri bona afero (nefumado).

3. Ofte okazas, ke por Esperanto fervoras niaj izolitaj samideanoj en vilaĝoj aŭ malgrandaj urboj, kie ili ne povas sin sufiĉe apogi pri iu institucio, kiu praktike konfirmus, ke la movado esperantista ekzistas kaj estas forta, ke ĝi havas ampleksan bazon de sia aktiveco. La izolulo eble eĉ forgesas atentigi je simila kaj samtempa agado en aliaj lokoj kaj en okuloj de la publiko li aspektas kiel strangulo, utopiisto. El tiu ĉi vidpunkto estas necese, ke la kampanjo estu farata precipe de organizoj, aŭ kun ties almenaŭ morala helpo.

4. Estas necese atentigi, ke ni ne povas ĉiuokaze trotaksi la kvantiton de esperantistoj. Kiam ni propagandas, ni evitu tiajn homojn, kiuj ne promesas bone reprezenti nian movadon kaj ankaŭ nian landon. Ni ĉiam konsciigu, ke esperantistoj rilatas kaj letere kaj persone kun eksterlandaj ŝtatanoj. Niaj agoj estas observataj en skalo pli ol enlanda. Ni ne povas preparadi kondiĉojn por skandaloj des pli, ĉar niaj rilatoj estas internaciaj. Homoj, kiuj ignoras leĝojn jurajn, leĝojn moralajn aŭ ne estas spirite sanaj, estu evitataj de nia agitado. (En niaj vicoj ne estu loko por ili.)

5. Ne estas eble konsenti kun tiuj esperantistoj, kiuj inokulas al la movado nerealajn ecojn, apartigas ties membrojn de la ceteraj homoj, kvazaŭ aparteno al nia movado estus ia legitimilo de bona homo. Ni ne povas distanci nin de la cetera publiko, ĉar ni ne estus komprenataj. Ni estu avantgardo precipe en senco de internacia interkompreniĝo, sed aliflanke ni ja estas ordinaraj homoj. La eventuala sankteco de iuj membroj estas nedezirata. Nia rimedo de internacia interkompreniĝo ja estas plej moderna, do ankaŭ nia sinprezento antaŭ la publiko estu tia, estu prudenta kaj ne freneza. (Mi esperas, ke vi komprenas mian celadon kaj ne vidas konflikton inter tiu ĉi kaj la antaŭlasta punkto.)

6. Fine mi volas akcenti ankoraŭ unu gravan faktoron, kiu eble estas la ĉefa vojo, kiun iri promesas sukceson. Ĝi estas la scienco de internacia lingvo, la interlingvistiko sur la bazo de Esperanto. Kiam ekzistos gravaj koncernaj sciencaj publikaĵoj, kiam la scienco estos agnoskata, la grupo de interlingvistoj postulos laŭ siaj esploroj la enkondukon de internacia lingvo: en tiu kazo la laboro de propagandistoj estus pli facila. Nuntempe la interlingvistikaj verkoj estas nur sporadaj, kaj nesufiĉe profundaj. Estas dezirinde, ke en lingvosciencaj revuoj de la diversaj landoj aperu pli da artikoloj de tiu speco kaj de la interlingvistiko kiel lingvosciencaj kaj socisciencaj disciplinoj tiel estu pli kaj pli evoluigataj kaj diskonigataj. Kompreneble sur tiu ĉi kampo povas labori nur la plej spertaj fakuloj, ne ĉiu entuziasma libervola esperantisto.

J. Werner

KELKAJ SPLITOJ PRI SET-60

Krom la gvidantoj kaj instruistaro partoprenis en la unua etapo 56 kursanoj, en la dua 53 kursanoj, inter ili unu polino (Gdynia), grekino kaj hungaroj.

En ambaŭ etapoj estis po 50 instrueroj, 40 estis dediĉitaj al faka instruado, 10 al politika eduko.

Kiu ne sciis naĝi, havis okazon lerni ĝin sub gvido de fakuloj. Sporta ekipo estis parte prunte ricevita de Svazarm. Dukla-konkuron okazigis ambaŭ etapoj.

Laŭprofesia konsisto de la kursanaro: 27 laboristoj, 21 oficistoj, 29 studentoj kaj lernantoj, 12 instruistoj, 6 flegistinoj, 4 pensiuloj, 2 dommastrinoj, 1 ministro, 1 terkulturisto, 1 kantisto, 3 personoj kun akademiaj titoloj.

Tendargvidantoj: I. -R. Wolkovinský, II. -K. Franc, ekonomia gvidanto en ambaŭ etapoj estis P. Sittauer.

Instruistoj: I. V. Novobilský, V. Novobilská, Ĉ. Závodný, Z. Rusín, E. Geleta, O. Kníchal.

II. -O. Schwetter, V. Novotný, M. Lorková, V. Podhradská, M. Matušková.

Kiam la vetero permesis, oni banis sin, ludis volejbalon, celpafis. Intergrupan konkuron oni aranĝis en volejbalo, kurado, ĵetado k.a. En plua vetero la ludejo fariĝis marĉejo. Estis akrobataĵo nur stari aŭ tri, Plej spertaj montriĝis la geinstruistoj, kiuj en la volejbala turniro venkis.

Serĉadon de trezoro partoprenis kvar grupoj. Helpe de Morse-alfabeto, Esperanto, sprito, post du horoj oni trovis la trezoron subakvigitan kaj ligitan al bastono en unu golfo de la lago. Ekskursoj okazis tri: al Vranov, Bítov, kaj Znojmo. Ĉiam ĉeestis ĉiuj tendaranoj. El tio ekestie malfacilaĵoj. Aŭtobuso estis plenplena, ankaŭ plena de grumblado de la ordinaraĵoj. Neforgesebla estas piedira ekskurso al Cornštýn. En suna vetero nin surprizis kelke da gutoj. Nur eta nubeto, apenaŭ videbla. Sed daŭris nur momenton onia fola (bláhový) konvinko, ke ne povas plui pli. Pluvegis kaj akvo leviĝis. . . Pli ol unu horon la bravaj SET-anoj staris kiel ruboj de bonhumoro inter ruinaĵoj de Cornštýn, po kvar-ses sub unu pluvmantelo.

Meze de la dua etapo, dimanĉe posttagmeze, la Arĝenta golfo paliĝis pro envio, ke la bordo estas atentanto de io eksterordinara - de internacia karnavalo. Sprite preparitaj maskoj kaj kostumoj faritaj preskaŭ el nenio kaj tamen tiom variaj, buntkoloraj kaj trafaj. Ni nur povas bedaŭri, ke ĝi estis filmata nur sur nigrablankan filmon.

La tendara vivo estis filmata. Ĝi estas planata pro 30 minutoj, sed ankaŭ teknika prilaboro ĝia projekcio daŭris preskaŭ du horojn.

La tendaro havas propran puton kaj lavejon. Ĉu venontan jaron SET posedos duŝojn kun varma akvo? Estas necese pritaksi la tutan SET-60 kaj ree klopodi pri pluaj plibonigoj. La pritakson oni faris en Štířín ĉe Praha la 21-23. de oktobro. Kiel sukceson ni povas SET konsideri en ĉiu kazo, precipe pro bona organizo, bonkvalitaj kursoj, laŭdinda verovo de A- kaj B-kursanoj kaj ankaŭ pro la fakto, ke neniu alia nunjare kapablis prepari kolecion aŭ tendaron, krom junularo. Danko apartenau al la teknika aranĝanto, la rondeto de Distrikta Kleriga Domo en Třebič kaj al la preparkomitato, kiu laboris sub gvido de D. Kočvara (Ostrava) kaj K. Franc (Pardubice), sekretarian laboron faris M. Matušková (Opava). -

Kaj nun, ankoraŭ vidante la tolan urbeton apud Lančov, ni jam eklaboru por garantii la SET-61!!

jer

Nia spegulo

KOREKTO

Ni informis, ke la Esp. Klubo en Praha akiris novan klubejon en Týnská-strato, Ni korektas, ke tie troviĝas la kluba biblioteko, sed la kunvenoj okazas plu merkrede en Smečky 26. Tamen aŭtune la klubo eble ricevos novan kunvenejon en la palaco sur la insulo Slovanský ostrov.

BELEGA ESPRIMO DE INTERNACIA SOLIDARECO!

Kelkajn tagojn post katastrofo en la minejo Hlubina atingis nin kondolencia letero el Francio. El ĝi ni citas! ". . . ni esprimas profundan kunsenton al familianoj de la mortaj ministoj, al sindikata ROH-sekcio de minejlaboristoj kaj al via rondeto. Ni petas pri traduko kaj transdono de tiu ĉi letero en manojn de la nomitoj. "

Mondpaca Esp. Movado, Franca sekcio. Kompreneble, ĉion ni plenumis kaj dank-esprimo al Francio de ROH sekvis. Tia agado helpas en nia afero kaj servas al vera interkompreniĝo, solidareco kaj paco. Dankon al francaj pacdefendantoj.

Esp. rondeto en Poruba

NOVAJ E-RONDETOJ FONDITAJ.

Iniciate de la Kleriga Kunularo estis fondita nova Esp. rondeto en Heřmanův Městec, distrikto Chrudim. Samtempe estis en la montrofenestro en la strato Šimonka: malfermita daŭra Esperanto-ekspozicio. Ekde la 16-a de septembro 1960 estas aranĝita la unua elementa E-kurso por komencantoj. Ni petas, bonvolu pruntesendi al ni "propagandan materialon. . Antaŭdankon!

El letero de A. Nydrle el Kladno ni sciiĝis: ". . . denove funkcias la niaurba uzina "Esperanto-Rondo de SONP Kladno", al kiu aliĝis jam pli ol 25 personoj. Niaj kunvenoj kun Esp. kurso estas aranĝataj ĉiujŝaŭde je la 16-a horo en la kulturĉambro de la 13-a etaĝa turloĝdomo n-ro 4, Kladno-Rozdělov, Tř. budovatelů. Tien ni nun translokiĝos ĉiujn niajn esperantaĵojn.

VIETNAMA AMBASADORO INTER ESP. EN PRAHA.

K-do N. V. Knih, vietnama ambasadoro en Moskvo, Budapeŝto kaj Tirano, pasigis vesperon la 14-a de julio inter pragaj esperantistoj en kafejo "Filmový klub".

RADIO FRANCE PRI ESPERANTISTOJ EN PRAHA.

La franca sekcio de la Ĉeĥosl. Radio en Praha surbendigis franclingvan intervjuon kun J. Šustr kaj J. Mařík el la Esp. Klubo en Praha pri omaĝo de la Klubo al la Provenca poeto F. Mistral kaj ĝia ĉeĥa tradukinto S. Bouška. Ĝi estis elsendata 8.11.60 je naskiĝtago de Mistral.

ĈE NEDERLANDAJ PACDEFENDANTOJ.

Vesperan feston por adiaŭi kun karavano de nederlandaj paclaborantoj aranĝis fine de julio la Ĉsl. Komitato de Pacdefendantoj en sia sidejo, la bela Kounic-palaco en Praha. La renkontiĝon, kiun partoprenis ankaŭ esperantistoj el la karavano (i.a. Cor de Waart) kaj reprezentantoj de la Esperanta Klubo en Praha, karakterizis sincera internacia amikeco. jm

SUR SNĚŽKA (NEĜA MONTO) 26.6.1960.

renkontiĝis 38 ĉeĥoj, 5 poloj, 1 bulgaro. El Liberec 13, Náchod 3, Teplice 3, Kolín 3, N. Město n/Metují 3, Bělohrad 6, la pluaj el Hradec Králové, N. Paka, Hronov, Praha, Stráž n/Nisou, Chrastava. Oni parolis pri disvolviĝo de la movado k.a. La uzina gazeto "Tatrovák" en Kolín detale raportia pri la atanĝo.

RENKONTIĜO EN OSEČEK

La 10-an de julio 1960 okazis la renkontiĝo de esperantistoj sur la bordo de Labe apud vilaĝo Oseček. Venis 30 esperantistoj el Dymokury, Kolín, Liberec, Litoměřice, Městec Králové, Pardubice, Velký Osek kaj 2 danoj. S-ano Pytloun parolis pri nuntempa laboro de rondetoj, pri ĈEK kaj pri neceso helpi al ĝi. Sekvis vigla debato.

EN KABANO DE UZINO "TATRA KOLÍN" EN SAMOPŠE.

kunvenis la 3-an kaj 4-an de septembro 96 esperantiatoj por interŝanĝi spertojn kaj ĝui la pejzaĝon apud Sázava.

ESPERANTO EN SLOVAKAJ REGIONOJ DE Ĉ S S R,

estas reaperanta informilo de niaj slovakaj amikoj (adreso: Esperanto, Martin, poŝtfako C-22.). En la septembra numero ni legis interalie pri la nacia artisto Martin Benka kaj lia rilato al Esperanto, kiu estas pli ol favora. Martin Benka ankaŭ uzas Esperanton por siaj notoj kaj okaze verkas mallongajn prozaĵojn. Unu el ili alportas la bulteno.

TRI SEKCIOJ EN BRATISLAVA.

Esperanto-rondeto ĉe la Urba Domo de Klerigo havas 3 sekciojn: politikan, literaturan, studan. La membroj okazigis kelkajn prelegojn en la Societo por vastigo de politikaj kaj sciencaj scioj, la literatura sekcio publikigis kelkajn artikolojn pri signifo de Esperanto en slovaklingvaj gazetoj, komencis kunlabori kun la Asocio de verkistoj. La studa sekcio aranĝis 5 kursojn, ankaŭ por altlernejoj.

EN BANLOKO RÁJECKÉ TEPLICE 17.-18.9.1960.

Ĉirkaŭ 70 esperantistoj ĝuis la ĉarman angulon sub Fatra, diskutis, dancis kaj ekskursis. La debatoj estis altnivelaj kaj konkretaj. Kunsidis ankaŭ la Ĉs. Esperanta Komitato el Praha, partoprenis ankaŭ referantoj de la ministerio kaj de la Instituto de Klerigo.

BELAĴOJ DE MORAVICE

titolas ekspozicio de fotografajoj el valo de tiu ĉarma rivereto, instalita en Opava kaj nun en Hradec ĉe Opava. Aŭtoro de la kolekto estas Josef Solnický, konata

tendarestro de niaj Someraj Esperanto Tendaroj apud Moravice.

TRA OCEANOJ SUB ĈEĤOSLOVAKA FLAGO.

Eksmembro de la Esperanto-Junularo en Ostrava, Fero Ptáček, fariĝis maristo. Unue li konatiĝis kun akvo de Danubo kaj Nigra Maro, nun li apartenas al nia mara ŝipanaro. Kiel li skribis al ni de sur Danubo, li ĉie serĉis verdan stelon, en Budapeŝto, Beogrado, en rumanaj kaj bulgaraj urboj (Ruse), en Sovetunio ... ". . . mi spertas, ke esperantisto havas geamikojn en la tuta mondo kaj nenie estas sola". Ostravanoj deziras al vi favoran venton kaj ĝojas je viaj vojaĝ-priskriboj ankaŭ pro FAJRERO!

POLA ESPERANTISTO J. Zawada el Warsovio prelegis en Brno, Bratislava, Prievidza kaj Bojnice.

KIU SCIAS KONSILI?

En nia unua socialisma urbo, en Poruba, ekzistas Esperanto-rondeto. Ĝi estis fondita sub patroneco de esperantistoj el VŽKG, sed la fondintoj jam ne zorgas pri ĝi. Ne zorgas pri ĝi ankaŭ pluraj iamaj fervouloj, kiuj nun loĝas en Poruba. La rondeto vivas, kursas kaj programas, sed bezonas kaj atendas helpon, precipe de lokaj esperantistoj. Konsilu, kiel gajni ilin por kunlaboro?

Lád'a Adámek (Poruba, Hornická 304).

DIAPOZITIVOJ EL SET - 60

Esperanto-rondeto ĉe PKO en Ústí n/L. povas al vi prunti serion de koloraj kaj nigro-blankaj diapozitivoj pri nunjara Somera Esperanto-Tendaro apud valbaraĵo Vranov n/D. La diapozitivoj havas vortakompanion kaj povas inde kompletigi programon de iu via kunveno. Por kovri la elspezajn pagos la rondetoj po 15.- Kčs. Oni prunte-sendos la dispozitivojn laŭ sekvo de alvenintaj mendoj.

Adreso: V. Novobilský, Slavíkova 346, Ústí n/L.

INTERBABILADO EN OSTRAVA

okazis jam tradicie 28.10. - 30.10.1960. Ĉiujn kunvenojn kaj amuzvesperon partoprenis ĉirkaŭ 150 gesamideanoj. Bedaŭrinde, ĉi-jara programo ne atingis nivelon de pasintaj Interbabiladoj. Menciinda estas nur parolado de s. Kei Kurisu el Japanio, kiun sekvis vigla diskuto.

KASTELO ŠTIŘÍN ĈE PRAHA

estis 21-23. 10 sub signo de verda stelo, ĉar tie efektiviĝis dutaga seminario de funkciuloj de esp. rondetoj el tuta ĈSSR. Ĉeestis ĉ. 60 personoj, interalie ankaŭ membroj de ĈEK, reprezentanto de Osvětový ústav en Praha kaj Bratislava kaj reprezentanto de Ministerio de kulturo. Pri interesa kaj riĉa programo ni raportos venonte pro manko de loko.

RONDETO EN KOLÍN RAPORTAS:

De la 3-a ĝis la 10-a de novembro ni aranĝos seminarion kun granda Esperanto-ekspozicio. Ĉefa programo estos 3.-4.11.: donacvespereto, kunvenoj, vizito de ekspozicio ktp. Ni atendas multajn gastojn.. Kiu aliĝos ĝustatempe ĉe J. Trnavský,

Kolín, ZK Tatra Kolín povos ricevi fervoj-rabaton.

Nia rondeto por faciligi eldonadon de esperantaĵoj kaj por festi 40-an datrevenon de ekesto de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio organizas kolektadon de malnova papero inter niaj anoj. Ni volas por ĉiu membro transdoni po 5 kg. Samtempe ni alvokas aliajn rondetojn, ke ili sekvu nin.

Rim. de red.: Ni rekomendas, ke ĉiuj rondetoj pritraktu tiun ĉi agon kaj helpu al Kolín. Kvitancojn de Sběrné suroviny sendu rekte al s. Esp. Komitato.

ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKA GAZETARO

"KULTURNÝ ŽIVOT" n-ro 36 (Bratislava 3.9.1960) - artikolo:

"Bulharský príklad" (Bulgara ekzemplo) de D-ro I. Havaš pri kulturaj interŝanĝoj pere de E. en Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio.

"PRÍRODA A SPOLOČNOSŤ" n-ro 13 (Bratislava - julio 1960). Tripaĝa artikolo "Ĉu vi parolas Esperanto" laŭ intervjuo de D-ro I. Havaš, sekr. de rondeto de esp. en Urba Kleriga Domo en Bratislava.

"FILATELIE" n-ro 12 (Praha 20.6.1960) - "Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko" - aperis en Esp.

"DIKOBRAZ" n-ro 31 (Praha 4.8.1960) indikas sub unu el siaj satiraĵoj, ke estas ĉerpita el "Esperanto" (UEA) per traduko de V. Váňa.

"NOVÁCKÝ KAHANEC" n-roj 28-29, 30, 31 (Nováky 2.8., 6.8., 13.8.1960) - artikoloj kaj mencioj, ekz.: "Pri Esperanto el vidpunkto de Literatura Centro", informoj pri la movado, eldonaĵoj, kursoj.

-0-0-0-0-0-

LA MOVADO EKSTERLANDE

LA MISKOLCA RADIO donas nun dek minutojn en kaj pri Esperanto, sed nur unufoje monate: la duan ĵaŭdon de ĉiu monato (Ondl. 188.8, 1594 kilocikl, inter 18-19 horoj)

ESPERANTO-FONTOJ EN HUNGARIO. Unu estas en montaro 50 km de Budapest kaj la dua estis nunjare printempe inaŭgurita apud urbo Miskolc, en banloko Lillafüred apud pitoreska lago. En la urbo Miskolc estas krom Esperanto-placo nun ankaŭ Zamenhof-strateto. Zamenhof-straton havas ankaŭ Budapest en sia eksterurba parto.

P. B.

EL LA HUNGARA MOVADO.

Laŭ dekreto de la instruad-ministerio Esperanto estas instruebla en mezlernejoj de la lando kun speciala ministra permeso, kiel eksterordinara fako kaj oni povas fari

ankaŭ ekzamenon. Tiaj okazis jam kelkloke, ekzemple en gimnazio de urbo Gyula kaj en Szeged eĉ abiturientaj ekzamenoj en du gimnazioj.

Oficiala geknaba revuo de la Pionir-Asocio en redaktaj sciigoj alvokis tiujn, kiuj deziras korespondi kun multaj landoj kaj ne scias aliajn lingvojn: ili lernu Esperanton.

La Hungarlandan Esperanto-Konsilantaron, la nunan centron de la landa movado gvidas nun pro abdiko de ĝen. sekr. Lajos Márton, provizora sekretaria komitato. Laŭ la projektoj en 1961 oni fondos Landan Societon, kiu apartenos al la Landa Sindikata Konsilantaro kaj eldonos krom monata sciigilo ankaŭ ilustritan kulturan kaj socian revuon. La ĝisnuna Bulteno ne plu aperas en 1960. Oni esperas, ke la nova organizo povos pli efike kunlabori kun UEA, kun la Mondpaca Esperantista Movado kaj kun la esperanto-organizaĵoj de aliaj landoj, samtempe pli forte kuntenante la landas movadon.

Kiel lastsomere, ankaŭ nunjare P. Balkányi faris en geknabaj tendaroj paroladojn pri Zamenhof, Esperanto, infankorespondado kaj paclaboro. (Entute en kvin antaŭ sume 500 geknaboj.) Li montris ankaŭ ekspozicion pri diverslandaj infankursoj. Julio Ulm faris paroladojn en pionira-geknaba tendaro ĉe lago Balaton. La Hungara Pedagogia Sindikato gastigis en Budspesht anglan profesoron James H. Jump, kiu kun edzino kaj fileto vizitis la landon. Li parolis ankaŭ en Esp. kunveno, simile f-ino Elna Sörensen el Kopenhago, Petko Bonev el Stara Zagora, Bulgario.

Okaze la Finm-ugra Kongreso en Budapest Paul ARISTE, membro de la Estona Scienca Akademio el Sovetunio, vizitis la kunvenon de la budapeŝta "Konkordo" Fakrondo ĝuste, kiam s-no Balkanyi laŭtlegis salutleteron de prof. Bokarev el Moskvo, anoncante la alvenon de la lingvoscienculo. Estis ĝoja ekmiro, kiam s-no Ariste ekstaris kaj anoncis sin, ke jen li jam alvenis. Li tuj faris tre interesan kaj valoran paroladon pri progreso de la movado, pri instruado kaj somertendaro en Estonio kaj pri la scienca uzo de la internacia lingvo. Pri tio raportis ankaŭ mallonge ĵurnaloj.

Alia gasto estis profesoro M. J. Z i e m e k el la pola urbo Katowice, kiu interese parolis pri la floranta pola movado kaj pri sia vojaĝo en Ĉinio antaŭ du jaroj, kie li spertis, ke per Esperanto oni bone konigis la polan literaturon en ĉina lingvo kaj ankaŭ la Pola - Ĉina Amikeco Societo oficiale uzas la lingvon. En la Poŝtista fakrondo Julio B a g h y komencis komencantan kaj progresantan kursojn, krome seminarion pri la esperantistaj verkistoj. Tie funkcias ankaŭ bona biblioteko. Similan aranĝas nun la Konkordo fakrondo. La urba biblioteko en Szeged estas preta aranĝi Esperanto Muzeon.

P. B.

EN ĈEFURBO DE OKCIDENTA UKRAINO. La Esperanto-movado en Lvov revigliĝis. Ekde j. 1958 ekzistas Esp. Sekcio ĉe Domo de Sciencistoj, okazis kursoj en Universitato, politeknika kaj medicina institutoj, en Biblioteko de Alilanda Literaturo k.a. Junularo organizis junularan grupon "Sonorilo". La grupo rilatas kun organizaĵoj en senco progresigi nian aferon. Adreso: USSR, Lvov, . str. Mickiewiczza 6, Domo de Sciencistoj (Esp. Sekcio).

KION NI SCIU PRI LA "HUNGARA "DEMANDO"? La UNO havas sur la tagordo

la "Hungaran Demandon", sciigis la gazetaro! Sed kio estas efektive tiu "demando" kaj kio estas reale malantaŭ ĝi? Kial Usono kaj ties amikoj volas ĝin denove pritraktigi? Petu pri tio en Esperanto respondon kaj klarigojn de la Hungarlanda Packonsilantaro, Budapest, V. Belgrad rakpart 24. Oni preparas esperantlingvan bultenon pri ĝi. Atentigu viajn amikojn, ke ili ankaŭ informiĝu ĝuste. P. B.

ALVOKO!

INTERNACIA FILATELIA EKSPozICIO EN BUDAPEST 1961.

Petu informojn, prospektojn, aliĝu al Esperantista. fakkunsido! Asocio de Hungaraj Filatelistoj, Budepest VI, Népköztársaság u. 3. Proponu ekspoz-materialon!

ALVOKO AL LA PROFESOROJ, INSTRUISTOJ! Geknaboj 12-18 jaraj de la Politeknika Esperanta Studrondo por Pioniroj "Ezermester" (aŭ Milmajstroj) deziras amikiĝi kaj korespondi kun eksterlandaj gelernantoj pri politeknikaj laboroj.

En kadro de la lerneja politeknika instruo funkcias multaj laborgrupoj:

1. Biologio-Botaniko-Zoologio (divessfakaj).
2. Radio-Telefono-Televido.
3. Film-Foto (Por junfilmoperatoroj, reĝiŝoroj, filmafiŝoj, reklam-grafikistoj).
4. Geografio-Naturamiko-Geologio.
5. Modelado de Maŝinoj, Flugiloj, Ŝipoj, Fervojaj veturiloj, Elektraj-optikaj, mekanikaj ludiloj.

Ni kolektive petas ĉiujn esperantistajn geinstruistojn, profesorojn, siajn gelernantojn, ke ili bonvolu amase skribi al nia "Studrondo".

Nia adreso estas:

Politeknika Esperanta Studrondo por Pioniroj "Ezermester" Budapeŝto, XI, Distrikta Ĉefurba Lernejo. Fővárosi Fiuiskola, Baranyai-utca 18, Magyarország.

ALVOKO FOR INTERŜANĜO DE SPERTOJ PRI LA EDUKADO DE MENSMALFORTAJ INFANOJ AL METIOJ. Ĉeĥoslovaka metilernejo en urbeto Sadská, kiu estis fondita en 1958, edukas la mensmalfortajn infanojn en la aĝo de 15-16 jaroj pro metioj de masonisto, vandpentristo kaj terkulturisto - bredisto. Ĝi estas unu el lernejoj, kiuj edukas la infanojn, kiuj ĝis nun estis needukataj kaj vivaĉis en la homa socio, ĉar ili ne sufiĉis al tempiro de lernado, de normalaj infanoj. Nia ŝtato decidis eduki ankaŭ tiujn infanojn kaj envicigi ilin en la homan socion aŭ dotigi ilin tiel, ke ili sciu mem vivteni sin kaj ne estu ĝeno de la socio.

En nia metilernejo estas la mensmalfortaj infanoj preparataj por la suprenomitaj metioj. Ili loĝas en la lerneja internulejo, ili lernas necesan teorion kaj laboras ĉefe praktike.

La metilernejo tre ŝatus interŝanĝi spertojn pri ilia edukado, instruado kaj laborado. Ni estas pretaj sciigi niajn ĝisnunajn spertojn kaj aranĝojn, kaj volas ekscii, kiaj estas aliaj eblecoj aŭ plibonigoj.

Ni atendas viajn proponojn de reciproka interŝanĝo de spertoj al la adreso: Josef Chvosta, Gottwaldova 221, Poděbrady, Ĉeĥoslovakio. Ni nepre respondos.

--0--

EN PROFUNDA MALĜOJO NI SCIIGAS AL VI:

S-ano Jiří HROMADA en Praha, filo de s-ano R. Hromada, mortis 19.7. estante 38-jara. Siatempe li gvidis librotendonon de EAĈSR kaj lastatsmpe kunlaboris en vortarista laboro de sia patro.

S-ano František OMELKA en Otrokovice mortis 23.6. en aĝo de 55 jaroj. Li estis instruisto kaj aŭtoro de pluraj literaturaĵoj por infanoj. Esperantlingve li verkis "Aventuroj de Antonio", "La Alasko stafeto" kaj "Kaptitoj de la glaciokoj". La dua el ili aperis ankaŭ en la ĉeĥa, germana (3x), bulgara kaj dana lingvoj. "La granda amiralo" estas en manuskripto.

KONKURSO DE FAJRETO 1960

En tiu ĉi numero ni publikigas rezultojn de la dua kaj tria konkurs-serioj. Poentado de unuopuloj perdis sian sencon, ĉar la duan kaj trian serion partoprenis nur nemultaj gesamideanoj kaj krome plejparte ne tiuj, kiuj partoprenis la unuan serion. Mi decidis sekve pritaksi ĉiun serion memstare kaj nur ĉe la lasta mi konsideros ankaŭ rezultojn en la antaŭaj serioj.

Venkinto de la 2-a serio, 2-a kategorio, estas s. Jiří Patera en Most, kiu ricevas libron de Z. Naĥkowska "Medalionoj". Tre altnivelan kontribuadon sendis s-ino B. Trávníčková el Ústí n/L., s-aninoj Z. Rejlová kaj B. Daňhelová el Třebíč, s-anoj J. Cink kaj J. Tichý el Králíky. En la unua kategorio de la sama serio venkis s-anino O. Horáková el Odry, kiu ricevas libron de M. Ziolkowska "Doktor Esperanto". En la intergrupa konkurso venkis Králíky.

Venkinto de la III-a serio, dua kategorio, estas s-ano J. Cink el Králíky. Li ricevas libron "Medalionoj". Interesan konkursaĵon sendis en tiu ĉi kategorio s-anino Rothová el Poprad. En la unua kategorio venkis s-ano J. Otta el Králíky. Li ricevas libron "Doktor Zamenhof". Ankaŭ ĉi tie venkis la grupo Králíky.

Mi sincere gratulas al ĉiuj venkintoj.

Iom malfrue venis el Bulgario (s-ano Ĉudomír Kantarĝiov) kontribuado por la unua serio. Temas pri kolektiva kontribuado de la Esperanto-grupo el Sliven. Dankon kaj gratulon.

LA IV-A KAJ LASTA KONKURS-SERIO

1-a kategorio:

44/ Přeložte do esperanta:

"Pořád ještě vál jihozápadní vítr a obrovská ledová kra ještě pořád plula dál a dál na moře. Na kře bylo čtrnáct rybářů a dva koně. Muži byli zabráněni do práce, prosekávali v ledu díry, spouštěli sítě do vody a žádný si nevšiml, že se kra začala odpoutávat od břehu. Byli na to upozorněni až už záchrana nebyla možná. Jeden kůň se totiž rozběhl ke břehu. Šestnáctiletý chlapec Kárlense se za ním pustil na druhém koni a dohonil ho kus od kraje, odkud bylo vidět, že kra se vzdaluje na moře. Rychle se vrátil povědět kamarádům co se stalo, ale když doběhli k okraji kry, nebylo už naděje že by mohli doplavit na břeh. Juris Skar, který měl doma ženu a tři děti, podlehl zoufalství, skočil do vody a bylo vidět, že nedaleko od kry se potopil.

(Z knihy "Smrt na kře")

4b/ Pri kiu problemo vi plej multe cerbumas en lastatempo?

2-a kategorio:

4a/ Klarigu signifon de la ĝenerala kunsido de la Organizaĵo de Unuiĝintaj nacioj 1960 por la homaro.

4b/ Felietono el via ĉi-jara libertempo. (Temo libervola).

Je la fino-tradukoj de pasintaj taskoj:

I-a kategorio:

3a/ Oni al mi diris, ke vi havas lueblan ĉambron ekipitan per meblaro. Kie oni povas aĉeti maturajn pomojn, nuksojn kaj vakciniojn? Mi ne ŝatas supon. Donu al mi prefere truton kun majonezo. Laŭ mia opinio la kunlaboro de junaj esperantistoj kun plenaĝaj estas necesa. Kie oni vendas memoraĵojn? Mi volonte ion alportus al mia familio el Ĉeĥoslovakio.

3b/ Věřím, že esperanto je nejživější příklad mezinárodního bratrství dělníků. Hrušky a švestky jsou z Československa, pomeranče ze Španělska a hrozny z Bulharska. Tyto květiny musí být přesazeny buď na podzim nebo na jaře. Proč se nehlásíte k návštěvě této pověstné továrny?

B- K U R S O - AL KURSGVIDANTOJ:

La instruado en daŭriga kurso devas esti planita. Ne hazarde elpreni ion el gramatiko aŭ literaturo, sed metode traekzerci ĉion bezonan. Komence de la kursperiodo oni faru al si la programon (kiom da lecionoj kaj kion ili enhavos). Kaj plu estas nepre bezone, la kursgvidanto preparu sin por ĉiu leciono kaj ne "improvizu".

J. Cink

EKZ. 45-a: Skribu kaj ellernu: české "až" se do esperanta přeloží 3 způsoby:

a/ ĝis = až do, až k, až na, až po, do, znamená nepřetržitý děj nebo stav,

b/ kiam, ve smyslu "když",

c/ nur, ve významu "teprve".

EKZ. 46-a: Traduku: Iru ĝis arbaro! De tagmezo ĝis la tria mi dormis. Mi venos, kiam mi estos preta. Mi venos nur morgaŭ.

EKZ. 47-a: Decidu, kiamaniere oni traduku ĉehan vorton "až" en jenaj frazoj: Jdi až na konec ulice. Půjdeme až úplně nahoru. Až to skončí, hned jdu spát. Schůzka bude až v pátek. Byl tam skoro až do půlnoci. Až do dneška jsem o tom nevěděl. Od školy k nám je to asi 300 metrů. Až ti ji přinese, oznam mi to! To počká až večer. Znal to všechno do A do Z.

EKZ. 48-a: Traduku la frazojn el pasinta ekz.!

EKZ. 49-a: Legu: 1, 3, 5, 10, 7, 2, 4, 8, 5, 7, 1, 4, 10, 7, 8, 6, 9, 6, 5, 4 !

EKZ. 50-a: Legu: 31, 27, 25, 12, 11, 26, 30, 28, 21, 23, 18, 16, 15, 19, 22, 366, 1958, 1850, 5212, 23000, 1200, 123, 1526, 1820, 1929, 5000, 1400, 24, 92, 1945, 1848, 1742, 237000, 1870, 13, 52, 1918, 1866, 1942, 1870, 17, 233, 20, 700, 1914, 1620, 1958, 900000, 1960, 24, 521, 1925, 1248, 1961, 1962, 29, 357, 100, 1887, 1724, 7600, 88000, 1965, 426, 84, 716, 152, 188, 1531, 8900, 365, 156, 1950!

EKZ. 51-a: Legu: 1/2, 1/4, 3/4, 2/5, 7/8, 5,40; 44,23; 2.14; 18,50; 2,50; 2,40; 2,60; 0,6; 0,005; 324,5; 1/3, 2/6, 4/7, 35, 24 !

EKZ. 52-a: Lernu la nekonatajn el sekvantaj vortoj: grafito, gumo, paŝtelo, kreto, linealo, triangulo, cirkelo, ĉininko, fontplumo, koverto, glui, leterkesto, leterportisto, presaĵo, rekomendita, pakaĵo, stampo, stampilo, aviadilo, sendinto, poŝtpagilo, enlanda, eksterlanda, aboni, artikolo, ĉefartikolo, anonco, linio, sciigo, alineo, titolo, aŭtoro, paĝo, tradukinto, eldonejo, librovendejo, bindita, broŝurita prezo.

KZ. 53-a: Respondu kaj formu similajn demandojn: Per kio oni skribas? Desegnas? Faras cirklojn? Rektajn liniojn? Kio estas en fontplumo? Kiu inko estas la plej nigra? Kio estas triangulo? Ĉu oni povas inkan skribon forgumi? Kion oni povas forgumi? En kio estas letero? Kio estas sur malantaŭa flanko de koverto? Sur antaŭa? Kien oni metas leterojn? Kiu alportas ilin? -Kio poval esti presaĵo? Kiaj leteroj estas rekomenditaj? En kio oni sendas objektojn? Kial oni ne povas uzi poŝtmarkon dufoje? Per kio oni stampas? Kiom kostas afranko por enlando? Por eksterlando? Kiel oni povas sendi per poŝte monon? Kiujn gazetojn vi abonas? Kiel nomiĝas partoj de artikolo? Diru titolon de libro, kiun vi lastatempe legis! Ĝia aŭtoro? Kiom da paĝoj ĝi havis proksimume? Kie ĝi estis eldonita? Ĉu ĝi estis originala? Kia estis ĝia prezo?

EKZ. 54-a: Traduku la rakonton el Kabe-legolibro kaj provu kapti sencon de la legita sen traduko: TRI MUSOJ. Superstiĉa reĝo vidis en sonĝo tri musojn: grasan, malgrasan kaj blindan. Matene li demandis sian edzinon, kion signifas tiu sonĝo. Ŝi respondis: "La grasa muso estas via ministro, la malgrasa estas via popolo kaj la blinda estas via portreto".

EKZ. 55-a: Post elserĉo de nekonataj vortoj traduku la rakonton el la pasinta ekzerco kaj poste rakontu ĝin!

EKZ. 56-a: Faru konkurson en scio de vortoj: en difinita tempolimo skribu ĉiujn vortojn, kiujn vi konas kaj kiu komenciĝas per litero P. Poste aprezu vorton, kiun havas neniu ol unu, per 5 poentoj, kiun havas du, per 3 poentoj, kiun havas tri kaj pli, por 1 poento. La samon, faru kun litero ekzemple: Ĉ, S, O, Z, L, ktp.

EKZ. 57-a: Skribe traduku (hejma tasko): Kdo pŭjde se mnou? Musím jít s dopisem na poštu. Děláám všechno levou rukou. Čím to otvíráš? Zpívejte s námi! Jen s velkou námahou jsem to dokončil. Co tím chceš říci? Nemám se čím oholit.

EKZ. 58-a: Priskribu vian ĉefon laŭ aspekto kaj karaktero (hejma tasko)!

Daŭrigota.

GRAVA ... NE PROKRASTU !

Bonvolu skribigi multajn alvokojn al RADIO Budapest, ke vi tre simpatias kun la hungara popolo, petas regulajn sciigojn pri ties vivokulturo, progreso ESPERANTE.

-o-0-o-

LEKANTETO

Porinfana paĝo de Fajreo

KIEL KOLUMBO ELTROVIS AMERIKON.

(El dana lernolibro libere laŭ "Juna Voĉo"
de la E. J. Berlin-jan, -feb. 1960).

Hispana reĝo kaptis ideon eltrovi Amerikon. Li alvokis Kolumbon kaj demandis, lin: "Ĉu vi povas eltrovi Amerikon, Kolumbo?" - "Jes, mi scipovas! ", respondis Kolumbo.

Post kelkaj tagoj la ŝipo estis preparita kaj Kolumbo kun granda ovo en mano enŝipiĝis. La historia ekspedicio komenciĝis. Dum la tuta vojaĝo Kolumbo sidis en sia kajuto kaj penis surtable starigi la kunprenitan ovon. Post kelkaj semajnoj li fine sukcesis pri tio kaj la ŝipestro informis lin, ke li ekvidis Amerikon. - "Mi scias, respondis Kolumbo, ĉar la ovo jam staras. " La ŝipo direktiĝis rekte al la tero kaj post nelonge ĝi alordiĝis en Ameriko.

Sur la marbordo staris granda amaso da indianoj. Kolumbo kun kelke da akompanantoj enboatiĝis kaj remis al la bordo. Unuafoje en la historio liaj piedoj tuŝis la amerikan teron.

Kolumbo venis al la indianoj kaj demandis ilin:

"Ĉu vi estas indianoj"? La indianoj respondis:

"Jes, ni estas indianoj. Kaj ĉu vi estas Kolumbo"?

"Kiam Kolumbo jesis, la indianoj paliĝis kaj ekkriis:

"Ho ve, ni jam estas malkovritaj!"

Kukolo

MOLTO RAPIDE
1. DEZIRANTE TRINKI HALTIS MI DE FONTETO ĈE RAND',
JEN AŬDIĜIS EL ARBARA FON' DE L' KUKOLO LA KANT',

PIU RAPIDE
LA KANT': HO LA LA HO LA LA URIA HO LA LA KUKU

1. HO LA LA TIRA HO LA LA KUKU,
2. HO !

1. Dezirante trinki haltis mi de fonteto ĉe rand',
jen aŭdiĝis el arbara fon' de l' kukolo la kant'.

2. Diru al mi, kara kukolet', kial kaŝas vi vin,
diru al mi, kie estas nun mia kor-amatin'.

Rf. Ho la la !
/: Ho la la tiria,
ho la la kuku,:/
ho la la tiria,
ho la la kuku,
ho la la tiria, ho!"

Tradukis Josef Cink

La deveno de la kanto kaj la originala teksto estas nekonata. Kiu scias ilin, bonvolu informi nin.

NI RECENZAS

VIENNE EN DELFINIO - faldprospekto pri "Vienna Pulchra: laŭ la latina poeto Martinal, urbo 27 km de Liono. Eldonis: Syndicat d' initiative, Vienne, Francio. Poŝtkarto "15 JAROJ DE LIBERA ĈEĤOSLOVAKIO", eldonita de E-rondeto de ZK VŽKG estas mendebla po 0,15 Kčs ĉe "Fajrero".

JUNULARA KANTARETO

Esperanto-rondeto ĉe Kulturdomo de ROH en Ostrava-Poruba eldonis pere de presejo Severo grafia en Ústí n/L. 1-an kajeron de la juranlara kantareto. Sur 46 paĝoj A/5 enhavas sume 54 kaj originalajn kaj tradukitajn popularajn kantojn de la ĉeĥoslovaka junularo. La kompilinto s-ano J. Cink mencias, ke li envicigis "ankaŭ kantojn, kiuj el poezia vidpunkto ne havas altan nivelon, sed la junularo ŝatas kaj ofte kantas ilin". Pri la indiko de deveno kaj aŭtoro li diras: "La nomoj de aŭtoroj kaj tradukintoj kaj deveno de la kantoj estas menciataj tiel, kiel estis eble havigi informojn pri ili el literaturo kaj muzikaĵoj. Se ili mankas (Tute aŭ parte) do ni ne povis trovi ilin". Ni atentigas ĉi tie la kompilinton pri malagrablaj eraroj: ekz. kantoj "Dancu, dancu", "Bonan nokton" estas evidente slovakdevenaj kaj ne ĉeĥaj popolaj kantoj.

La bele aranĝita broŝuro kun neta teksto kaj muziknotoj estas por ni vera surprizo. La kantareto estas ne malhavebla helpilo por kultura laboro de ĉiu Esperanta grupo. Ĝi estas ankaŭ konvena donaco por via eksterlanda amiko. La modera prezo 5.- Kčs certigas, ke ĝi disvastiĝos en ĉiujn grupojn. Ĉiuj ĝisnunaj mondoj ĉe adm. de Fajrero estas registritaj. Pluaj mendoj estas akceptataj ĉe administrejo de la bulteno.

V. Novobilský

KOREKTU EN LA 3-a NUMERO !

"De ŝpinfibro al teksumajo"- pĝ. 6, linio 4-a: bonkvalitajn punktojn (ne punktojn!)
En vortareto: tordoblighi - skát (ne tkát), posamento – prýmek (angl. krajka)..
Aŭtorino de ĉi artikolo estas Marie Bartovská.

"Lingva anguleto"- teknika terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj, pĝ. 20: almo = stojina (ne strojírna!)

